# *Festo kaj homvarmo: Festivalo de Salso en Cuba 2020*



Inter la 25-a de februaro kaj la 1-a de marto kunvenos en la Club 500 muzikistoj kubaj kaj eksterlandaj en la V-a Festivalo de Salso en Cuba 2020, sub la gvido de la elstara muzikisto kaj produktisto Maikel Blanco, gvidanto de la muzikensemblo Salsa Mayor.

La festivalo plifortigos la altajn valorojn de la kulturo evoluigita de nia lando per montrado de la plej bonaj talentoj de la popola muziko kuba.

La festivalo havos inter siaj plej elstarajn momentojn, la prezento unuafoja en Kubo, de la kantisto, komponisto kaj produktisto portorika Víctor Manuelle kun sia orkestro, kiu fermos la festivalon per koncerto.

La? informis la organizantoj, ?iutage prezenti?os tri a? kvar orkestroj, kiuj je la 8-a vespere koncertos, anta?itaj de dancensembloj, figurantoj, Djs, ?iuj  re?isoritaj de la provinca centro de spektakloj kaj karnavaloj, kiuj ekos ekde la 4-a posttagmeze. Anka? okazos danclecionoj de afrokubaj ritmoj por la eksterlandaj ?eestantoj.

Tre elstaraj kubaj orkestroj sin prezentos dum la salso-festivalo, interalie, Manolito Simonet kaj Los Van Van, Eliades Ochoa, Alain Perez, NG La Banda, Alexander  Abreu, Adalberto Álvarez kaj aliaj elstaruloj de la salso en Kubo.

La festivalo de la salso ofertas multajn tagojn de muziko, ?ojo kaj homvarmo, tiu kiu spite al la malfacila?oj kaj agresemoj eksteraj, neniam ?esos kaj anka? bonvenigas eksterlandajn vizitantojn pretaj ?ui kun ni en bonaj kaj en malbonaj okaza?oj. Tiel estas la kubanoj kaj plu estos ?iam, konfirmis la organizantoj.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/cultura/214877-festo-kaj-homvarmo-festivalo-de-salso-en-cuba-2020


**Radio Habana Cuba**